




KUSPE

"KUSPE" Oficiala informilo de Eŭska Esperanto-Asocio
Euskalerriko Esperanto Alkartearen aldizkaria

N-ro 16. AŬTUNO 97.

GERNIKA

60
jaroj



utilaj adresoĵoj


ELDONAS: Eŭska Esperanto-Asocio

Zapateria 29.
E- 01001. Vitoria-Gasteiz.



KUNORDIGANTO : Rafael Blanco Arbe.

Larrainbide 3, 3.ezk.
E-31800. Altsasu. Tlf. (9-48) 56 38 99.



ALAVO. ALAVA ESPERANTO-ASOCIO.

SEKRETARIO. David Sánchez Agirregomezkorta
Pintor Pablo Uranga 5, 1. C.
Vitoria-Gasteiz. Tlf. (9-45) 22 45 50



BIZKAJO. Grupo Esperantista de Bilbao

Barrenkale Barrena 7, 1.esk. Bilbao.
E-48005. Tlf. (9-4) 416 44 92. (19-21 horoj.)



NAFARO. Asociación Esperanto Navarra.

Casa de la Juventud. Gaztediaren Etxea.
Sangüesa 30. E-31500. Pamplona-Iruñea.

La enhavo de artikoloj ne
nepre kongruas kun la opinio
aŭ agadprincipoj de la Asocio.

Koxkorron Taldea-anoj
enpaŝigis la kovrilon
kaj kontraŭkovrilon.

SALUT-VORTOJ

Datrevenoj...Kelkfoje scivoleme ni rigardas la efemeridojn serĉante pasintecon, nian historion. Ĝin ni povas fari nostalgicele, lernocele aŭ kun la intenco mastri la estontecon... Ĉiu-tage, ĉiu-jare ni trovas okazintaĵojn de la pasinteco, kaj ĉiu-tage, ĉiu-jare ni kreas efemeridojn kiujn ni mem aŭ niaj posteuloj prientos aŭ "olimpike" preterpasos.

Ĉi-jare ni renkontiĝas inter pluraj aliaj kun tre specialaj memorindaĵoj. La 19an de aprilo 1937, senkompata bombado detruis la bizkajan urbon Gernika dum la hispana civila milito. La signifo de la vilaĝo por la eŭskistoj kaj la el-aviadila atako al civila loĝantaro dum foira tago kun la okazigo de centoj da mortoj skuis la mondon.

Gernika iĝis taŭga trejnejo por tuj okazonta dua monda milito kies konsekvenco estis certe teruregaj. Nuntempe oni volas ke tiu vilaĝo estu simbolo de la monda paco. Sed, ĉu oni ne tro mistifikas okcident-eŭropece (aŭ eŭro-pece) pri la monda paco? Kion opinius Mahatma Ghandi pri la "poŝtkarda" pacifismo de la reĝoj de la mondo en la erao de la neoliberalismo? Kion pri la eliro al la paco ĉe la lando kie troviĝas Gernika?

Aliflanke, kaj pli verdetose ni festas la 10an jariĝon de la fondigo de Alava E-o Asocio. Manpleno da junuloj kiuj plejparte jam parolis la lingvon kaj iomete aktivadis oficiale fondis la asocion iun dimanĉan matenon martan. De tiam pluraj viveroj, kursoj, vizitoj, ĝojoj, vojaĝoj, malemoj, festoj, agadoj, kunvenoj... okazis. La ĝisnuna ekzisto estis fruktodona, estontec-projektoj ne mankas sed la situacio en tiu-ĉi momento estas pli ombra ol luma.

Ĉi-KUSPE alvenas sufiĉe malfrue, la manko de kunlaboroj kaj reagoj estas la kaŭzoj. La puŝo kaj peto de la katalunaj amikoj tamen malpigrigis la redaktoron kiu speciale dediĉas al ili tiun-ĉi numeron.

ĈION BONAN

DEKA DATREVENO DE ALAVA E-O ASOCIO

Nia kara Asocio jam iĝis dekjara. Kiam en la jaro 1987, centjariĝo de kreo de Esperanto, grupeto da revemaj junuloj fondis A.E.A.n, ni ne imagis la grandajn fruktojn kiujn ĝi alportus al la Esperanta movado. La iluzio estis la plej grava moviligo por alfronti la taskojn kiuj venintos.

Rapide ni komencis legiĝon de la Asocio, ricevon da subvencioj; propagando, per konferencoj, kaj stando dimanĉa en surstrata brokantejo, kaj uzo de malavara apogo de amaskomunikiloj, klasoj senpagaj, kontaktoj kun Grupo de Bilbao kiu dekomence helpis nin, kaj partopreno amasa en kongresoj

Poste alvenis kreo de revuoj, fondajiĝo de Eŭska Esperanto-Asocio, organizo de Dumpaska Renkontiĝo, naciaj intensaj kursoj, floraj ludoj, ktp.

La Asocio atingis la pinton, kaj poste venis la deklino, kaj la krizo, manko da instruistoj, manko da lernantoj, malapero de Eŭska Kverko, fiasko koncerne la integriĝon de Grupoj esperantistaj de Bilbao, kaj Nabaro en EEA, seniluziĝo, kaj manko da fortoj.

En tiu kriza situacio, estis kunvokita grava asembleo, kie partoprenis grandparte la membraro. El tiu asembleo de antaŭ jaro kaj duono oni decidis celebri nian dekan datrevenon, per eksposicio kiu montrus la grandan laboron de la Asocio, kaj ĝia alporto al socio dum tiuj jaroj; kaj per aliaj aktivajoj kiuj rilatus kaj propagandus Esperanton kaj tiamaniere impliki, instigi kaj iluziigi la asocianaron.

Jen raporto pri la rezultoj de la datrevena programo (februaro-marto 1997):

Ni atingis por ĉi programo subvencion de la Diputacio en la jaro 1996, kaj 1997 po 75.000 ptoj jare; kaj ni dungis asocianon por pretigi parte la aktivajojn. Ankaŭ ni ricevis apogon de Telefónica, kiu senpage instalas telefonlinion por konekti internet.

La anonca afiŝo estis tre altira kaj vidinda; kaj la disvastiĝo estis tre granda, preskaŭ 400 ekzempleroj suface bone metitaj en strategiaj lokoj. Ni ne faris kiel antaŭvide klarigan broŝuron por la eksposicio, sed ni havis unu faritan de Vital Ŝparkaso, bedaŭrinde ĝi iomete aĉis.

Eksposicio pri la 10a datreveno, kaj pri Esperanto, kun Konekto al internet. Rilate al vidbendoj, nur estis projekciita tiu de Mazi, sed homoj apenaŭ ĝin spektis. Vizitis la eksposicion ĉ.200 personoj, malmultaj de la Asocio aŭ konatuloj, kelkaj homoj montris intereson lerni E-on. La enhavaro ne estis ĉio antaŭvidita, sed sufiĉa. La prezentado estis tre digna.

Kinoforumo- Pro la longa daŭro de la filmo, estis nur projekcio. Partoprenis ĉ.30 personoj, neniu de la Asocio. Ankaŭ atingis kelkajn homojn interesitajn lerni E-on.

Eŭsklingva debato sub la titolo "La turo de Babel tuj falonta? Aŭ lingvovarieco sub danĝero?", Inter la parolantoj ni gastigis vicministron pri Edukado de Eŭska registaro. Partoprenis ĉ.35 personoj (malmultaj de la Asocio) kaj proks. 5 foriris post scii ke ĝi okazos eŭske. La debato estis interesa, kaj evidentiĝis ke Esperanto havas ludontan rolon. Ni profitis por doni al la parolantoj la tradukon al la kastilia de la projekto "Neighbour", eksperimento por montri la propedeŭtikan valoron de Esperanto en la eŭropaj instancoj.

Konferenco kastilie sub la titolo "Esperanto, malfermita fenestro al senlandlima mondo" Partoprenis ĉ.25 personoj, malmultaj de la Asocio aŭ konatuloj. Ni kontaktis tri interesituloj

Eldono trilingve (Eŭske, Kastilie kaj Esperante) de rakonto "La despedida" (La Adiaŭo de Ignacio Aldecoa. (Fama mortinta verkisto de nia urbo) atendante ricevi permeson de la vidvino de Aldecoa. Estas propono inkludi aliajn rakontojn.

Apartan ĉapitron meritas la eksterordinara eĥo en la amaskomunikiloj

Kiel alifoj ĉi estis la flanko pli kontentiga danke al grandega disvastigo. Oni publikis intervjuon en El Correo kaj du en El Periódico de Álava. En ĉi lasta ĵurnalo ankaŭ aperis noticon kun foto de la ekspozicio. En Egunkaria (eŭske kaj por tuta Eŭskio) aperis raporto. Ankaŭ aperis novaj pri eŭsklingva debato, kaj pri Esperanto, en prikultura paĝo de semajna periodaĵo Empresarios del País Vasco (Entreprenistoj de Eŭskio) kio rimarkindas pro sia specifa publiko.

En Televido, estis intervjuo en Telenorte (Por la eŭska aŭtonoma komunumo), du en Canal Gasteiz kaj alia en Televitoria (Lokaj).

En Radio estis intervjuoj almenaŭ en La Ser, Radio Correo, Radio Vitoria, kaj Euskadi Irratia (eŭske kaj por tuta eŭskio),

Krome en ĉiuj ĵurnaloj, kaj supozeble en la radiostacioj oni informis ene de la agendoj kulturaj pri ĉiuj programeroj, same kiel en la urbodoma gazeto (senpage trovebla en ĉiuj ĵurnalvendejoj) kie aperis, krom ĉiu aktivaĵo en sia loko, speciala citaĵo pri nia 10a datreveno. Anoncante la tutan programon.

La Prezidanto. Natxo Apaolaza

La lundon 26an de aprilo de 1937, kadre de la hispana civila milito, okazis gravega epizodo kiu sendube influis la disvolvigon de tiu konflikto, iĝis provejo por tiu baldaŭ okazonta dua mondmilito kaj fiksas mejloŝtonon en la militaj strategioj: LA BOMBADO DE GERNIKA.

Kion oni scias pri tiu vilaĝo nomita Gernika? La demando de la leŭtenanto-kolonelo Wolfram Von Richtofen restis senresponda. Fakte la vera celo de la germana arme-aviadila taĉmento estis Madrido, la ĉefurbo de la Respubliko, sed la ĉesto de la internaciaj ambasadejoj malebligis tiun atakon.

Kion pri tiama Gerniko? Ĝi temis pri 7000 enloĝanta urbo kie la ĉefaj okupoj estis la agrikulturo, komerco kaj komenciĝanta industrio. Tiun jaran aprilon tie troviĝis aldonaj 3000 rifuĝantoj alvenintaj el proksimaj vilaĝoj pro la risko ĉe la frontlinio.

Nenio ŝainigis, ke la katolika, tradicia kaj simbola Gernika iĝos kelkfore tio kion Goering asertos en Nuremberg, nome, "simpla provejo" cele efektivigontajn atakojn kontraŭ civila logantaro.

THE TRAGEDY OF GUERNICA

TOWN DESTROYED IN AIR ATTACK

EYE-WITNESS'S ACCO!

From Our Special Correspondent

BILBAO, Apr

Guernica, the most ancient town Basques and the centre of their cultural life, was completely destroyed yesterday afternoon. The bombardment

Euzkadi

PREZIDENTO	FRANCO
MINISTRO	...
...	...

Gernika, en llamas

Como si se tratara de simbolizar la victoria del amor sobre el odio, en la villa hoy aparecen intactas la Casa de Juntas y el Arbol de la Libertad



La teroro komenciĝis la kvara kaj duono posttagmeze en foira tago kiam svastikmarkita aviadilo trapasis super la vilaĝo ĵetante tri-kvar bombojn, la unuajn de longega serio. De tiam kaj dum tri horoj kaj kvarono la fajrokoloro ne haltis, ĉiun dudek minutojn bombplenaj aviadiloj vakigadis siajn dolorliverantajn ventrojn ĉiam okazigante rean ceremonion de aflikto kaj turmento. Infanojn, maljunulojn, neniun respektis tiu kontraŭ civillogantara atako.

La vilaĝo estis tute detruita, 70% el la konstruaĵoj estis disbatitaj. Nur unu procento el la domoj restis je sia antaŭa tuto. La sankta kverko, simbolo de la antikvaj legoj, kaj de la eŭskaj liberecoj rezizitis stare ĉe la haoso.

Rilate la kvanton de la mortintoj la esploristoj ankoraŭ ne alvenis en konsenton. La oficiala cifero donita de la tiama eŭska registaro nombris 1654 mortintojn kaj pli ol okcent vunditojn. Aliaj mencias ducent mortintojn. Ĉiukaze mankas definitiva esplorado pri tiu aspekto de la hombuĉado.

Krom la kruelon, la senkompaton kaj eĉ la sadismon Gernika devis duafoje suferi aldonan suferon, nome, la mensogon.

Kvankam la tuta mondo baldaŭ konis la teroraĵon, la kaŭzantoj kaj venkintoj (german-ital-hispanaj faŝistoj) disvastigis la kalumnion, ke komunistoj, framazonistoj, separatistoj ktp. instigis la atakon, aljugante al asturaj ministoj la "forbruligon" de la vilaĝo. Kiam la faŝistoj venke atingis Gernikon ili verŝis benzinon inter la ruinojn por iel pruviĝi la mensogon ofendigante senlime la survivantojn.

La konsekvencoj estis pluraj, la norda frontlinio baldaŭ falis kaj la restaĵoj de la eŭska militistaro kapitulaciis en Santaña. La faŝistoj eniris en Kantabron kaj Asturion. La provo pri surcivil-logantara bombado "sukcesis" altnivele kaj dum la Dua Mondmilito pluraj "Gernikoj" ekestis.

La debato ĉe la katolikoj (interese dokumentita en peceto de la filmo "Pereira asertas") reliefigis la senhontan sintenon de la oficiala eklezio rilate la faŝismajn reĝimojn.

Nuntempe rekonstruita kaj burĝa Gernika estas internacia centro de grupoj kaj iniciatoj celantaj esploron kaj dokumentokolektadon sur konfliktoj kaj pacstarigo; ekzemple, la asocio "Gernika gogoraturz" (memorante Gernikon).

Pere de la 60 jardatreveno de la bombado omaĝoj, festivoj, rekonvoj okazis denove en tiu bizkaia vilaĝo. Koncerne la sintenon de la germana registaro oni sciigu pri la monlivero de sufiĉe granda sumo al Gernika fare de demokratkristana registaro. Verdaj kaj socialistaj deputitoj petis oficialan agnoskon de memkulpigo kaj pardonpeto sed ĝi ne estis aprobita. Malgraŭ tio la prezidanto Roman Herzog (ne la gubernestro Kohl) montris sian konsenton al tiu iniciato.

Post 60 jaroj, tra la tuta mondo aliaj "Gernikanoj" suferegas pli aktualajn konsekvencojn de la malakordiĝo de homgrupoj kaj de la nehaltigebla evoluo kaj sofistiko de la armila teknologio. Dum sesdek jaroj oni sufiĉe antaŭeniris en la packonstrua inĝenierfako ?



PRIGERNIKAJ POEMOJ


Julio Mangada, esperantisto kaj generalo de la respublika armeo, verkis e-lingve kanzoneton omage al la martira urbo Gernika laŭ la muziko de malnova baska himno "Gernikako Arbola".

PROLETO AL LA CELO !

Prolet' en ĉiu loko
alkuru kun akcel',
ĉar sonas la alvoko:
"Proletoj al la CEL'!
Vekiĝu la konsciencoj
ĉar riskas la POPOL'.
For restu diferencoj;
nur estu sola VOL'!
Antaŭen kamaradoj;
postulas l' IDEAL,
ke niaj la BRIGADOJ
sukcesu en batal'!
Estu sola kriado:
REVOLUCI'!
UNI'!

J. Mangada

(El "Laboristaj Kronikoj" de Antonio Marco)



KOMIKSO DE ANTTON OLARIAGA ELDONITA EN 'EGUNKARIA'

GERNIKA

Julius Balbin (Usono)

Gernika, la plej antikva urbo
de l'vaskoj
kaj la centro de ilia kultura tradicio
estis komplete detruita
per bombardado fare de fremdaj aviadistoj,
aliancanoj de Francisco Franco.


La germanaj aviadiloj
de l'tipo Junkers kaj Heinkel
bombardis la urbon dum preskaŭ tri horoj
per 500-kilogramaj bomboj.
Aliaj aviadiloj descendis poste
super la urbo
kaj mitralis fuĝantajn loĝantojn.

Gernika ne estis objekto militara
aŭ industria. Ĝin tiam okupis
7000 loĝantoj kaj 3000 rifuĝintoj,
Pli ol cent homoj mortis
en la atako
kaj multe pli granda nombro estis vundita.

La urbo estis detruita
la 26-an de aprilo, 1937
kaj tuj poste la mondo
ricevis fortegan ŝokon, eksciante pri tio.
Ĝin plej grafike esprimis
Pablo Picasso en sia granda muralo,
titolita Gernika.
Pentrita sub la impreso de l'barbara bombardado,
ĝi restos por ĉiam
la plej elvokiva emblemo de l'hororoj
de l'moderna milito.

Eta parto de la bela Italio montris sin grandioze al niaj okuloj ĉi-somere per la sesa edono de la renkontiĝo "E.M.A.". La ĉiam ŝanĝiĝanta signifo de tiu ĉi aranĝo tiam kaŝis la esprimon "Ebriiga Mar-montara Aventura". Jes, ebriiga. Pro la amikoj trovitaj kaj retrovitaj, la vere mirindaj vidindaĵoj, la ligurja suno, la pura vitreco de la maro, la kareso de la arbara aero plena el multkoloraj aromoj ...

Evidentiĝis ke la esperanto-grupo ligurja pleniluzie organizis tiun ĉi okazaĵon, ĉar patrinece dorlotis nin per la altirantaj gastronomiaĵoj, la profesia gvidado tra nekredeble belaj padoj aŭ la daŭra zorgado pri nia komforto kaj bonfarto. Mi povus plenigi kroman numeron de Kuspe por danki la elkoran akcepton de niaj italaj amikoj. Ne temas pri troigo: en la gastejo de la vilaĝo Cabanne restas la varmo de ilia ĝentileco, kiu tion atestas.



Ni ekskursis en la natur-rezervejo de la valo d'Aveto, unu el la plej antikvaj kaj gravaj arbaroj en Ligurjo. Ĝi entenas buntan miksaĵon de arbospecoj, sed ankaŭ lagetojn devenantajn el glaciejoj. Aliflanke, niaj piedoj tretis la pinton de monto Penna, la plej alta de Norda Apenino kaj, siatempe, sekura rifuĝejo de rabistoj.

En la valo de Fontanabuona ni vizitis la ardezan ŝtonminejon. Dum la pasintaj tempoj la ekspluatado de tiu varo permesis la vivtenon al la malriĉaj kamparanoj, kaj nun fariĝis profitdona aktivado. La familio de la grava maristo Kristofo Kolombo devenis de tiu loko.

Ankaŭ ni malkovris Barbagelata-n, sur la alta vojo de la ligurjaj montoj, izolita en arbaro el kaŝtanoj, avelujoj kaj fagoj. La apuda monto Kaŭkazo konis nian gajan vagadon.

Kune kun la krutaj kaj imponaj deklivoj ni frekventis la maron kaj la juvelojn situantajn ĉe ĝi, kiel Sestri Levante kaj sia Golfeto de la Silento. De tiu alloga urbo ni direktiĝis al Punta Manara inter ĝardenoj, olivarboj, kverkoj... kaj panoramoj kies mirindecon mi decidis pruvi per vigla fotado, ĉar vortoj ne kapablas imagigi tiom da beleco.

Por ĉiam restos fiksita sur mia memoro la promeno tra la tipa urbeto marista Camogli, plena el ĉarmaj anguloj kie reĝumas sur la dommuroj la "trompe l'œil". Poste trapasis ni du malsamajn specojn de arbaro: la norda -ombra-, kaj la suda -pli mediteranea- kies padoj kondukis nin al Sankta Fruttuoso, ĉe la marbordo. Aldonindas ke nur atingebblas ĝi piede aŭ boate, ĉar la ĉirkaŭaj montkrutaĵoj malpermesas la konstruadon de ŝoseo.

Por urbido kiel mi tre strangas ne trafi la neeviteblajn aŭtojn, sed mi atestas ke ekzistas lokoj ne atingeblaj eĉ per montoaŭto. Kaj tio ĉi estas vera ripozo.

La intensa tago finiĝis per ŝipveturo al celo de mondaj gravuloj: la ege mirinda urbeto Portofino, kiu ne suferis bombodetruadon dum la milito ĉar la nazioj amis ĝin.

Dankon, dankon, dankon al la samideanoj de la esperanto-grupo de Chiavari pro tiu semajno, sep fojojn bela, kiu ebligis ne nur resanigi, sed ankaŭ ampleksigi la animon.

Ĝis la venonta E.M.A.

Andi von Plaza.

LA LEGEMULO

(NIA LITERATURO SPECIMENE...)

Bonan Apetiton (Ĉapitro el "VAGADO SUB PALMOJ")

En tiu mateno, kiam Moseo haltigis la hebrea hordon por la ĉiutaga lunĉo, li dolore konstatis, ke la korboj enhavas nur sablerojn kaj kelkajn krus-taĵojn, tiel malmolajn, ke sur ilin malsategaj kadukulinoj rompus siajn lastajn dentojn. Mizero... Kaj ne eĉ la plej eta butikisto ĝis la vidlimo.

Sed Jahveo, inter du nuboj el blanka muslino, akompanadis la elektitan genton per patreca rigardo. Baldaŭ Li ĝin aŭdis frapanta siajn malplenaĵajn pelvetojn per neutilaj forkoj, kaj ritme kantanta, laŭ la fama ario: „La lampionoj estas la okuloj de la noktangeloj”.

—La supon!... la supon!... la supon!...

Kreskis la tumulto, jam pluraj grumbluloj minacis Moseon per siaj gameloj, tiam de la altnubaro defalis tiu mirakla nutraĵo, kiun ĉiu ĝissate glutis. La ĉiela manao savis la Patron de Izraelo, kaj kun li mian borsan agenton.

Nu, ankaŭ mi manĝis manaon.

Sprucante el la senlima plataĵo, la oazeto de Sbah aperas kvazaŭ masivo de plumbalailoj meze de futbalareno. La vento karese ludas tra la palmoj kaj subtile surŝutas la daktilflorojn per blonda sablo. El malmultaj putoj la loĝantoj ĉerpas akvon iomete salamaran, kiu kuras en kanaletoj kaj irigacas malvastajn terpecojn kultureblajn. Tie kreskas hordeo, milio, maizo, fabo, lento... kaj ankaŭ kanabo, kies elsekigitajn foliojn oni fumus en pipetoj. Kompatema herbo, helpema narkotiko, kiu trompas malsaton, sonĝe transportas la indiĝenojn en la Paradizon de Allah, kaj al mi okazigas marmalsanon.

Ĉiu zorgeme prilaboras sian ĝardenon kaj ĵaluze antaŭgardas siajn kreskaĵojn kontraŭ sekeco, insektoj aŭ malutilaj bestoj. Ĉar unu nesufiĉa rikolto neprigas malsategon, ruinon kaj mizeron. Katastrofa danĝero plej ofte minacas la nordafrikan vegetaĵaron: invado de akridoj, tiuj glutemaj bestoj, kiu formanĝas ĉion, kio kreskas: foliojn, lego-



Vagado sub palmoj

JEAN
RIBILLARD



mojn, herbojn, eĉ pajlon kaj stoplojn, kaj forlasas sian restoracion nur post kompleta dezertigado.

Ili naskiĝas en la sudo, ie, ĉirkaŭ la lago Ĉad. Ĉe iu bela mateno, kvietaj kaj rozaj kiel virgulino, al la nordo ekflugas la nenombrebla armeo, kaj kun zumbruo de ĉifita fajlo portas la morton en siaj teruraj makzeloj. La trairado de Saharo ilin ne malkuraĝigas, nenia baro ilin haltigas, nenio malhelpas trafi la allogajn herbejojn de la riĉaj marbordo. Oni eĉ vidis plurajn batalionojn transflugi Mediteraneon kaj festeni per niaj melonoj kaj olivoj de Provenco. Mi kredas, ke tiuj senhontaj ortopteroj, altirataj de la pariza vivado — Ho, *Paris by night* — deziris ĝui la lastan teatraĵon de Sacha Guitry, aŭ frandi verdajn en la Schwartz kabareto.

La grizflava flugantaro nebuligas la ĉielon, maskas la sunon, disvastigas sian timandan ombron sur la malfeliĉajn popolojn. Ĉe la vido de tiuj sovaĝaj invadantoj febre agitiĝas la vilaĝanoj, kiuj sin pretigas por defendi siajn bienojn. Vi certe konas la uzatan rimedon. Ne? ... Nu, jen:

Ekde la alteriĝo de la antaŭgvardio, virinoj kaj infanoj rapideme eliras el siaj kabanetoj, energie frapante kaldronojn, kuirpotojn, kaserolojn, per fortaj batoj de palmobranci, kaj superŝutante la vizitantojn per akraj krioj aŭ ofendaj insultoj. Kompreneble, la akridoj tiel malĝentile akceptataj forlasas ĉi tiun malgastigeman ĝardenon, kaj sin jetas sur la najbaran. Ho ve! ankaŭ tie senkompatema familio ilin forpelas sur la proksiman kampon, kie aliaj persekutantoj ilin sammalamike traktas. Bonvolu noti, ke nur virinoj kaj infanoj partoprenas tiun kruelan ĉason. La viroj, kaŭrante ĉe la sojlo de la dometoj, direktas la movojn, promesante la bastonon al la nefervoraj batalistoj.

La martirigado daŭras ĝis kiam la noktiĝo dro-nigas la spiteman oazeton en siaj malvaj vualoj, sub la malvarma lumo de la unuaj steloj. Finfine, forpuŝite de ĝardeno al alia, stultigite pro tiom da bruoj kaj krioj, venkita pro tiom da senhumaneco, kun malplena stomako, malgaje tranoktas sur la dezerta tero la fisenĝenaj vojaĝantoj.

Estas tie, ekstere de la nedifektita palmaro, ke la sekvantan matenon oni retrovas niajn barbarojn malviglajn pro senkomforta ripozo. Ĉar vi scias, ke tiuj insektoj povas ekflugi nur kiam la sunradioj

revarmigis iliajn rigidajn membrojn. Ĉe la palega antaŭtagiĝo la fruelliĝaj sbahaninoj ekvidas la lacepelitan armeon surtere dormema kaj prizonĝanta la grasajn legomĝardenojn de Alĝerio. Tuj ili kontraŭatakas. Ili kolektas kaj en grandajn sakojn rapide enŝovas la senmovajn kaj sendanĝerajn entrudulojn. Post unu horo ili hejmen kunportas dikan ŝarĝon da freŝa viando, kiu ornamas menuon kutime sen surprizo.


"Post fasto venas festo", dirus mia kamelisto.

Jam la unuaj sunradioj spronas la elsaviĝintojn de la morta rikolto. Tiuj peze ekflugas, dum la kaptitoj provizas la familiajn manĝokonservejojn. Frititaj en bolanta oleo la malbonŝancaj viktimoj elfinas sian aventureman ekziston sur la tablo de la delikataloj.

Promenante tra la vilaĝa vendejeto post abunda migrado de la pasloĝantoj, mi aĉetis unu frankon da tiuj sovaĝbestoj, kiujn mi gustumis tute krakentajn. Tio estas manĝebla ... eble iom seka ... bezonas spicon ... he, ĉi tiu estas sufiĉe bongusta ... tamen, tiuj muskoplennaj kruroj ... kiel? ... kun mustardo? ... jes, vi sendube pravas ... ha, tiu bela specimeno estas plaĉe mola ... Fatmah, ankoraŭ por unu franko ...

Evidente, mi konfesus, ke tiu manĝaĵo ne perfekte indas reĝan tablon, des pli ke tiuj flugantaj pilgrimantoj, post longa vojaĝo super senkreska dezerto estas tro malgrasaj. Kial ilin ne grasigi anstataŭ vendi tiujn skeletojn? Mi ja preferus ilin lardokovritaj kaj per aromajoj farĉitaj. Jen kio vekus apetiton.

Sed ŝajnas, ke "vera" manao, laŭ la juda modo, devas esti KRUDE manĝata. Mi ĉi tie ne diskutos pri gustoj aŭ koloroj, vi mem elektos post sincera provado.



Jean Ribillard 1904-1962



Jean RIBILLARD [ribiljar!] (1904-1962). Franco, majoro. Deforis multe ekster Eŭropo, precipe en Afriko, kaj ekŝiĝinte el la armeo tuj post la dua mondmilito, li mortis en Tahitio. Esperantiĝis en 1948. Redaktoro dum ĝia apero de la eŭropa eldono de "Budha Lumo". Kunlaboris al "Esperanto", "Heroldo de Esperanto", "La Nica Literatura Revuo" kaj per franclingvaj artikoloj al diversaj gazetoj.

En lia "Vagado sub Palmoj" (1956) "eta klasiko de sprito, blago kaj observo..." (Reto Rossetti), li priskribas vojaĝon en la dezerto kun majstra, ĝisbaroke riĉa stilo, humuro kaj ĉarmo. En "Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud" (1963) araba azeno filozofas pri la vivo kaj ties strangaĵoj. La filozofado estas eble malpli interesa ol la vivaj figuroj skizitaj kun akra psikologia penetremo kaj la priskribo de la moroj kaj medio de la araba mondo.

(Kálmán KALOCSAY, el "SKIZO DE E-LITERATURHISTORIO")

"VAGADO SUB PALMOJ"

(1-a eldono): Rotterdam: UEA, 1956.

(2-a eldono): Saarbrücken: Arthur E. Iltis, 1977, 52 paĝoj. Ilustrita.

"VIVO KAJ OPINIOJ DE MAJSTRO M'SAUD"

(1-a eldono): La Laguna: J. Régulo Eldonisto, 1963.

(2-a eldono): Saarbrücken: Iltis-Eldonejo, 1994. 143 paĝoj.



FIGERESa

SED

NE SUREALISMA

Aŭdinte ke ĉi-jara kataluna kongreso okazos en Figueres, memoro pri genia homo invadis mian menson. Ĝi temas pri la vilaĝo de unu el la plej grandaj artistoj de nia jarcento, nome, S. Dalí. Ĉu tie oni ankoraŭ trezore entenas la inspirofonton de la dorlanto de Gala?

La legendo pri la mita Tramontaro ankaŭ akompanas la rigardon al la urbo, onidiro pri tiu elnorda vento kiu trapasinte la apudmediteraneajn Pirineojn frenezigas homojn, svingas la sentojn, ineitas al maldecaĵoj... tiu vento mistera al kiu Dalí mem aljuĝis parton de sia genio. Kaj se ni al ĉio-ĉi aldonus la ĉeeston de la plej skandalema e-o junularo sur la konata mondo la perspektivoj pri "frenopatika" frenezetosa evento sovaĝis: Mediteraneo, Surrealismo, Ĥaoso, Pirineoj, sardanoj, arto, Luich Llach, Ludopiko, eliksiro sangosoifa...

Sed Tramontano blovis tiel forte kiel burĝasotanoj kantantaj "La Espero", la spirito de Dalí vagis turismece ĉe la foira homamaso. Filip senhonte europeas (ĉu ci Filipino, baldaŭ aliĝos al la sciencologia religio?). Ferriol daŭre plurlingvumas jen ĉuske, okcitan, galege, katalune, hispane kaj eĉ esperante. Iamaj plej kuraĝaj kaj ikonoklastaj e-istoj tamen ne plu skandalas en publika drinkejo per hispanhimna "Ĉinda-Ĉinda". Resume, ne plu da amo sur la monda surfaco.

Sed la oficiala fako de la afero nin plene satigis. La prelegejo inspiris la plej postuleman kulturvoranton, temis ĝi pri iama biblioteko belega kie okazis ege valoraj programeroj. Mi plej ŝatis tiujn de J. Armadans pri la nuna situacio de la pacifisma kaj kontraŭarmea movado, tiujn de D. Vitali pri minoritatoj kaj korekta prononco de e-o sonoj (kun taŭgaj mencioj al Martin Haase kaj "r" realigoj) kaj la literaturan prezenton de M. Seabra kaj A. Montagud. Aliflanke la muzika fako estis varie kaj digne reprezentita de la kabared-rokecaj Mamutoj kaj de la okcitan-folkloraj Aigarela.

La organizado elstaris, nur malglitiĝis kelkaj problemoj ĉe la internetejo la unuan tagon; oni atingis agrablan etoson kaj lokokoanoj ne respondecas pri la malviglo nokta en Figueres, sed kion fari?

Ni sopiris al surrealisma kaj tramontana urbeto sed valute ni ricevis modernisman kaj malfermitan Figueres kiu eĉ sardandancis kaj "homkastelumis" por ni kaj montris sian ĉarmon kaj la plej taŭgan drinkejon por manĝi "pá amb tomaca" (tomatpanaĵo). Nur mankas al ĝi forigo de la militistoj.

Odoro je naftaleno

Inter la 8-a kaj la 13-a de julio okazis en Valencio la 56-a Hispana Esperanto-Kongreso, organizita de HEF. Sufiĉe alta nombro da homoj parto-prenis la kongreson, inkluzive plurajn artisto-trupojn el Orienta Eŭropo, kvankam nur eta parto el ties membroj estis esperantistoj.

La kongreso disvolviĝis en la Filologia Fakultato de la Valenciana Universitato, kie abundis la studentoj kiuj sin preparis por la jar-finaj ekzamenoj. Ĉi svarmo da gejunuloj —tute indiferentaj pri Esperanto kaj pri la apude okazantaj aranĝoj— draste kontrastis kun la iom kaduka etoso de la kongreso. Oni sin demandas, kio do pri la junulara movado en la hispana ŝtato? Sed ja videble, supozante ke ĝi ekzistas, ĉi-specaj kongresoj ne allogas ĝin. Organizontoj do atentu ĉi fakton.

Koncerne la programerojn, al la subskribinto aparte plaĉis la modela oratoraĵo de Gian Carlo Fighiera —sen ajna papero kun notoj antaŭ la okuloj— pri Esperanto kaj la movado. Ankaŭ Miguel Fernández prelegis kaj deklamis kun karakteriza sentemo pri Federico García Lorca, kvankam kelkaj ŝtip-kapuloj kaptis ĉi okazon por tradormi lian deklamadon sub la ŝirmo de la frisketa temperaturo kiu regis en la aŭditorio.

Unu el la plej emociaj momentoj de la kongreso estis la omaĝo al du forpasintoj —la redaktoro de *Heroldo* Ada Fighiera-Sikorska kaj la madrida esperantisto Juan Carlos Ruiz—, kun la interveno de konataj esperantistoj kiuj rakontis pri siaj rilatoj kaj travivaĵoj kun la du omaĝitoj.

Du aliaj programeroj altiris la atenton de la publiko, kvankam la subskribinto ne povis mem ĉeesti: debato pri «La lingvoj de Hispanio» [sic!] sub la gvido de Antonio Alonso, kaj la prezento de la HEF-paĝo en Internet, far Marcos Cruz.

Sabate okazis tut-taga ekskurso al la vilaĝo Cheste, kie oni regalis la kongresanojn per giganta kaj bon-gustega paeljo. Pleniginte ĝissate siajn stomakojn, la esperantistoj ekiris amase al la vilaĝa teatro por spekti la prezenton de du novaj verkoj: la novelaro *Ekstremoj*, lasta akuŝaĵo de la literatura rondo *Ibere Libere* (J. Camacho, Liven Dek, M. Fernández kaj G. Neves), kaj la nefacile klasifikebla *Karnavale*, de la kataluno Abel Montagut, aŭtoro de *Poemo de Utnoa*. Por ĉi okazo estis antaŭvidita ankaŭ kontribuo de Fernando de Diego, kiu fine ne povis vojaĝi al Valencio, sed konfidis la voĉ-legon de sia prelego al M. Fernandez. Espereble ties teksto vidos la lumon ankaŭ sur la paĝoj de iu gazeto.

Rilate al la amasa parto-preno en la literatura matineo, maliculoj hipotezis pri la temperaturo je pli ol 35°C surstrate, pri la friska aŭditorio kaj pri la bezono digesti la paeljon. Sed ver-ŝajne temas nur pri onidiroj.

Por la lasta tago estis antaŭvidita ĝenerala kunveno de HEF, el kiu devus rezulti —se ĉio iris glate— la elekto de nova prezidanto: la juna madridano Miguel Angel Sancho. Ni vidos.

Irulaj

ESPERANTO ĈE NI

- En la lasta numero de la revuo Argia ni povis legi recenzon pri la metodo "Esperantoa Ikasgai". Tamen la priesperanta laboro de ĝia verkisto, Aitor Arana ne finiĝis kun la dua metodo verkita en la ĉska por lerni la lingvon de Zamenhof (la unua temas pri metodo de la unua duono de la jarcento, Esperantoaren Giltza). Arana finpretigas la lastan redakton de la traduko de la romano de Bernardo Atxaga "Behi euskaldun baten memoriak" (Memoroj de ĉska bovino), kies eldonon kaj prezenton ni senpacience atendas.

- "IS, tre rekomendinde", vi notu, atentigas Andi Von Plaza, nia plej itine-
ra esperantisto. Li ĉestis 40an Internacian Seminarion en la sudgermana urbo Freiburg, kiu per frosta akcepto puŝis la partoprenintaron, 350 gejunulojn, en la gastejon, etose pli varman kaj allogan. "Diskotekumado, ekskursoj (raportas A. Von P.) koncertoj, ludoj, debatoj kaj prelegoj plenigis la programon kies lejt motivo jenis: "Regionoj, ĉu veraj landoj?". Dum la silvestra balo ĉiuj ricevis la novan jaron dancante vestite per kostumoj tipaj de sia regiono. Frapite de la bunteco de de ĉi spektaklo (ne nur, ankaŭ kontribuis aliaj kialoj antaŭe endrinkitaj) la subskribanto proksimiĝis al knabo kiu ne sufiĉe freneze moviĝis kaj diris: Ĉu vi ne festas la novan jaron? Respondo: "Jes, mi povus. En mia lando, Nepalo, ni tion faros en somero kiam alvenos 2052a jaro."
Kompreneble, Esperanto ne ĉesas miri min kaj ampleksigi mian menson.

- Gravan e-eventon gastigos nia grupo kaj Vitoria-Gasteiz. Ni parolas pri okazonta TEJO-KER seminario en la alava (aŭ ĉska !?) ĉefurbo inter la 25a de Aprilo kaj la 2a de Majo 1998. Oni antaŭvidas partoprenon de trideko da gejunuloj de Eŭropo (oni koplodos venigi ekster-eŭropano(j)n). La temo pritraktonta estos "Homaj Rajtoj". Ni bezonos la helpon de la membroj de la asocio; por aliĝi kaj informoj telefonvoku al la kunordiganto de KUSPE aŭ al Naĉo, Txopo, Truto...

- Invitite de la organizantoj de "Intsumisoen Eguna" (La tago de la nesubmeti-
ĝantoj), Alava Esperanto Asocio aranĝis esperantaĝ-butikon por diskonigi informojn pri la situacio nuntempa de la internacia lingvo. Ĉefe oni disdonis flugfoliojn enhavantajn la "Manifesto de Prago"n.

KOVERTO DE LA ROMANO DE B.ATXAGA »

Behi euskaldun baten memoriak

Bernardo Atxaga

INFORMO AL EŬROPAJ INSTANCOJ PRI TEJO-KER SEMINARIO. (Kial nur anglalingve?)


World Organisation of Young Esperantists
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)
"Human Rights Under Pressure"

Vitoria-Gasteiz, Spain, 25 April - 2 May 1998

6 (six)

Esperanto (partly Spanish and Basque)

TEJO
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Tel.:+31 10 436 1044
Fax:+31 10.436 1751



Pamiela

krist-naske 1500!

PROPAGAND-BUTIKO EN AGURAJN KADRE DE LA "TAGO DE LA NESUBMETIGANTO"



INTERNACIA PANORAMO

Se ni rigardas la internacian panoramon antaŭ unu jaro, la situacio en preskaŭ ĉiuj aspektoj estas tute sama, Paco stagnas, aŭ eĉ malantaŭeniras, ekzemple en Koreio kaj en Bosnio, kie serboj estas dividitaj kaj proksimaj al intercivitana milito kiu momente oni evitis per balota akordo.

En Mezoriento la pactraktato, pli kaj pli putras. Clinton volas fari ion, sed la usona kompromiso kun Izraela sekureco malpliigas la eblecon esti neŭtra juĝisto en la zono). Nekutima interveno de libana regula armeo (kiu intervenis en la lasta hontiga malvenko de elitaj izraelaj trupoj en Libano), kaj rearmigo de Sirio povus degeneri al nova araba-izraela milito, iom post iom pli probabla.

Paco ja estas, sed kia paco? en eksa Zairio, post malvenko de (ĵus mortinta), Mobutu, mane de Kabila kaj liaj tutsioj el Rŭando-Burundo. Nun aperas jam klare ke Usono instigis la masakrojn kaj malordon en tiuj landoj, por poste kontroli veran celon, Zairio, kun ĝiaj strategiaj mineraloj; anstataŭante la franclingvan influon de Belgio kaj Francio, dum Unuiĝintaj nacioj fajfis pri la temo.

Sed Francio ne rezignas perdi influon en Afriko, kiel evidentigas en Komoraj insuloj, kie du insuletoj, disiĝis de Granda Komora, kaj petas reintegrigi en sian eksan kolonian metropolon, kiel Majoto, kiu restis depende de Francio kiam la ceteraj insuloj voĉdonis favore al sendependado.

La registaraj trupoj suferis grandan malvenkon post elsipiĝo, malgraŭ ke ili pensis ke temus nur pri armea promenado. Ĉu vere la ribeluloj volas dependi de Francio, aŭ estas nur maniero por atingi sendependon apogitaj sur granda potenco?

En Unuiĝinta Regno blovas novaj ventoj, inter alie rilate al nacioj kiuj konsistigas ĝin, Skotio kaj Kimrio havos aŭtonomion, kvankam la parlamento de Kimrio havos malpli da povoj ol Skotio.

Kaj en Nordirlando feliĉe, sanĝiĝis la situacio, kaj denove komencis batalhalto de IRA, kaj partopreno de Sinn Feinn en konversacioj, pro subskribo de deklaro de Mitchell kaj pro sanĝo de registaro en Britio, kiu jam ne bezonas unionismajn apogojn, kaj volas ludi pli neŭtran rolon inter unionismaj kaj naciismaj, kaj tio donas iom da espero al la katolikaj.

La problemo de Nordirlando ne estas facile solvebla, kaj la insistado de Blair garantii al unionismaj, ties apartenon al Unuiginta Regno ne koheras kun deziro de respublikanoj reunuiĝi kun Eirea Respubliko. Sed almenaŭ la halto en la perforto, kaj la akcepto en la konversacioj, kune kun la fortiĝo de Sinn Feinn en la lastaj balotoj ebligas avancon en pacproceso.

Ĉiukaze la ideo agnoski al Nordirlando samtempajn rilatojn kun Eirea respubliko kaj kun Grandbritio, kaj akcepti unionismajn kiel kunpatrianojn fare de respublikanoj, povas esti bona solvo por pli granda integriĝo de Irlando, sen perdi ĉiuj rilatojn kun Britio.

Se tiu ĉi konflikto solviĝus, jam nur restus Eŭskio kiel perforta etna konflikto en Europa Unio. Estas dezirinde ke ankaŭ en nia suferanta lando estus pasoj je direkto al Paco, similaj al tiuj de Nordirlando.



NATXO APAOLAZA

LA BONA KONFESO

Jon Mirande [?]*

Viro murdis sian edzinon. Komence li tre ĝojis, tial ke nun li vivis en bela paco. Sed poste, mi ne scias kial -parte pro la pezo de edukado kaj moroj, parte pro la onidiroj de la homoj-, iom stulte li ekhezitis ĉu li bone agis... kaj tiel okazis ke terura rimorso ekronĝis al li la konsciencon pro la murdo, kaj li ne sciis al kiu turniĝi por konsolo aŭ pardono.

Ĉi viro estis protestanto laŭ kredo, sed nun li taksis tiel abomeninda sian pekon, ke li ne kuraĝis alparoli rekte al Dio. Tial li decidis konfesi sian agon al sinjoro pastoro.

Kiam li eniris la kirkon, la pastoro salutis lin afable kaj ĝentile, ĉar la viro estis tre respektata kaj konforma al la moralo, edukiĝis en bona kolegio kaj regule legis la Biblion. Li redonis la saluton kaj diris:

-Sinjoro pastoro, mi venas por konsolo kaj repaciĝo kun Dio, ĉar mi pekis serioze: mi murdis la edzinon...

Sed la pastoro furioze ekkriis al li:

-For de ĉi tie, mizerulo sendia! Pafu vin, damna estaĵo, de ĉi hejmo dia!

Kaj la povra murdinto forkuris de la kirko kvazaŭ ĉiuj inferaj diabloj lin sekvus.

Post longa meditado pri la pastora rifuzo lin asisti, la viro decidis konfesi al katolika pastro ĉar, kvankam protestanto, li ne estis fanatikulo, kaj opiniis ke ankaŭ katolikoj iel kristanas.

Tiel do li venis al kirko kaj alpaŝis al konfesejo. Kiam la konfes-prenanto petis lin: "Eldiru viajn pekojn, mia filo", febla-voĉe kaj kun lipoj tremaj, li elbuŝigis:

-Pastro, mi murdis la edzinon!

Kaj la pastro dolĉis:

-Kiomfoje, mia filo?

El la eŭska: Joxemari Sarasua


* Mi ne tute certas pri la aŭtoreco de Mirande. Ver-ŝajne sama aŭ simila rakonteto povas cirkuli ankaŭ en aliaj lingvoj.

EL LA HISTORIO DE E-VEGETARISMO



En la E-movado partoprenas multaj vegetaranoj jam de la komenco de la E-movado. Inter ili estis grafo Leo Tolstoj, kiu donis fortan moralan subtenon al Esperanto kaj estis mem fervora vegetarano laŭ etikaj principoj. "La Fundamenta Krestomatio" enhavas impresajn artikolojn pri vegetarismo. Dum la UK en Dresden, 16 aug. 1908, laŭ iniciativo de Renė Ladevėze el Agen (mort. en 1913), estis fondita Internacia Unuiĝo de Esperantoj Vegetaranoj, kiu kelkajn jarojn poste plisimpligis sian nomon al la Vegetara Ligo Esperantista (VLE). Tolstoj per speciala skriba konfirmo akceptis ĝian honoran prezidantecon. La Ligo eldonis flugfoliojn en Esperanto pri Vegetarismo kaj en tri naciaj lingvoj pri Esperanto. En 1914 Oskar Bűnemann eldonis modestan dumonatan bultenon "Vegetarano" kiel ligilon inter la membroj kaj propagndilon inter esperantistoj por vegetarismo, inter vegetaranoj por Esperanto. Jam dum la 4-a Internacia Vegetarana Kongreso en Hago, 1910, Esperanto ludis gravan rolon. Kelkaj parolis esperante. Pro la milito la redaktanto en Milano devis transdoni en majo 1915 sian laboron al s-ino Maria van Rees en Utrecht, kiu gvidis la aferon ĝis la fino de 1916. Tiam la Ligo ĉesis funkcii. En 1920, dum la UK en Hago, vegetarismo ludis gravan rolon, multaj el la kongresanoj sidis ĉe la tablo de la vegetarana sekcio. VLE havis fakkunsidon kaj decidis la pluan eldonadon de la bulteno. La unua postmilita n-ro de "Vegetarano" aperis en oktobro 1920. De 1927 ĝis 1932 la gazeto estis samtempe la oficiala organo de la ne E-ista asocio - Internacia Vegetara Unio. Dum 1926 la bulteno aperis en la kadro de la revuo "Liberoj", presita en Sofio. Inter multaj estonaj esperantistoj la vegetarismo estis populara. Oni devas menciigi la nomojn de la fratinoj Timohovic, Benita Kärt, konata estona E-poetino Hilda Dresen k.a. Nun vegetarismo fariĝas populara en Estonio denove.




Vjaĉeslav Hromov

Prenita el Estona Vegetarana Esperantisto




La mondkonata elstara
verkisto Leon Tolstoj





MONTPELIERO REGIONO LANGUEDOC ROUSSILLON



83a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO MONTPELLIER. 01-08 AŬGUSTO 1988

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (ĉiuj en nederlandaj guldenoj)	ĝis 97 12 31 1-a periodo		ĝis 98 03 31 2-a periodo		ekde 98 04 01 3-a periodo	
Aliĝkategorio	A	B	A	B	A	B
1. ne individua membro de UEA	280	212	350	265	420	318
2. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	225	170	280	212	340	255
3. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA:	170	128	212	160	255	192
4. komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA	112	85	140	106	168	128

DIFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). *Ne temas pri Aliĝitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).*

Komitatano: Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA en la momento de aliĝo.

Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 68 01 01 kaj 77 12 31 (inkluzive). Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo postulas akompananton, kaj kiu pruvis tion per kuracista aŭ simila atestilo.

Senpage aliĝas:

- infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 77 12 31;
- nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.